

Claude kaj Andrée GACOND salutas siajn geaŭdantojn, 6.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1988 februaro

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1988-008/SRI-1988-008-A-3-Claude-kaj-Andree-GACOND-salutas-siajn-geaudantojn-6.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Ni daŭrigas nian salutadon al la geaŭdantoj, kiuj sendis vivsignojn. Fakte, alvenis leteroj, poŝtkartoj kaj aŭdraportoj el 41 landoj.

En Germanio Okcidenta ni havas multajn geaŭdantojn.

A.- Saluton al Erich SEIDEMANN en Dresden kaj al Rudolf SKORUPPA en Bad Wörlshofen, kiu interese raportas pri la teknikaj plibonigoj koncerne la kapton de kurtondaj elsendoj. Ni citas lian poŝtkarton :

Cl.- Altestimataj, decas ke mi denove vivosignu. Unue mi volas esprimi mian profundan dankon pro via senlaca poresperanta laboro suronde de Svisa Radio Internacia. Mia ebleco kapti vin estas nune teknike perfekta. Radioricevilo, tielnomata mondricevilo, Grundvig Professional 400 Satellite, kun frekvenc-stabila akcepto, butonelekteleco, provizejo de 24 stacioj tra ĉiuj ondoj, antaŭprogramigebleco en kadro de 24 horoj, kunligo kun surbendigilo - ĉio ĉi permesas al mi aŭskulti vin seninterrompe. Jes, mi povas konfesi, ke mi preskaŭ ĉiujn elsendojn lastmonatajn aŭskultis. Interferoj kaj fado kiel atmosfera bruo ne gravas malhelpe. Sole kelkfoje mia forgesemo rilate al la antaŭprogramigo. Ni esperu ke la nova generacio de radioriceviloj ebligos antaŭprogramigon en kadro de unu jaro aŭ eĉ pli. Estas fakte ideala ricevilo kaj se ĉiuj konvinkitaj gesamideanoj posedus ĝin, la lingva nivelproblemo estus solvita. Ĉar eĉ ne estasnte hejme, oni povas ĉiu libermomente reprodukti la disaŭdigon restante tiamaniere ĉiam freŝdate movadnovaĝe. Revo, ĉu ne ? Do, finante, al la teamo de esperanto-sekcio, okaze de centjariĝo de nia kara ideo, same pro la kvardeka datreveno de konstanta poresperanta servo de Svisa Radio, mi direktas sincerajn gratulojn al vi. Samideane, Rudolf Skoruppa.

A.- Ankaŭ saluton al Gerd STOTTMEISTER en Aachen. Hans Georg STRAUSS en Leverkusen kaj Günter VOGELMANN en Auenwald.

Cl.- Horst VOGT en Schwäb Hall kaj Reinhard WAGNER en Wolfenbuttel skribis:

A.- "Speciale mi ĝojis pri aŭskultado de la elsendaĵo "Cent jaroj de esperanto-instruado", kiun mi surkasedigis bonŝance, ĉar mi bezonas ĝin por gimnazia instruisto en nia urbo, kiu komencos oficialan laborgrupon en sia lernejo kun ĉirkaŭ 20 lernantoj. Lia lingvoscio ne jam estas granda kaj pro tio mi timas, ke li post kelka tempo konsciiĝos pri la diverseco de gramatikaj opinioj kaj ĉesigos sian laborgrupon. Laŭfakte li estas matematikisto. Ĝuste pro via mencio de instruantoj ne fanfaronantaj pri la atingoj de esperanto, kiuj persiste laboras en siaj lernejoj por la ideo de internacia lingvo, via elsendaĵo ŝajnas al mi taŭga por tiu "juna movadano", kiu ĵus eniris Esperantujon kaj tuj entuziasmiĝis. Mi donacos al li mian registraĵon."

Cl.- Ni esperas, ke tiu donaco ne malkuraĝigos tiun entuziasmulon, sed ke ĝi direktos lin unue al ellerno de la lingvo, antaŭ ol komenci ĝin instrui.

A.- Jünger WESTHOFF en Waltrop sendis al ni benon. Ni citas: "Tre kore mi salutas vin. Je la centjara jubileo de Esperanto mi sendas al vi plej korajn bondezirojn dezirante, ke Dio benu viajn klopodojn kaj fortigu nin ĉiujn per la kruco.

Cl.- Johann WINDISCH en Filderstadt skribis informiĝante, ĉu publikiĝas la tekstoj de niaj radioprelegoj. Ni respondu, ke en la revuo Svisa Esperanto-Revuo nun ekaperas artikolaro pri la ekdisvolviĝo de esperanto en Svislando, kiun ni ankaŭ disaŭdigas pere de Svisa Radio Internacia. Tre verŝajne la revuo Literatura Foiro publikigos nian raporton pri cent jaroj de esperanto-instruado. La tre grava studo de Andy KÜNZLI pri la slava civilizo espereble aperos artikolforme en Svisa Esperanto-Revuo aŭ sub formo de kajero de la kolekto Studoj ĉe Kultura Centro Esperantista. Ni peronde informos pri tiuj eldonaĵoj, okaze de ilia apero. Fakte la esperanto-gazetaro ne sufiĉe profitas pri la redakta aktiveco de la esperanto-prelegistoj. Ĉiusemajne esperanto disaŭdiĝas peronde dum pluraj horoj. Tre malmulto el tio reaperas sub la formo de presitaj dokumentoj, kontraŭe al tio, kio okazas en la naciaj lingvoj.

A.- En Germanio Okcidenta salutindas ankoraŭ Emil WÖHL en Bremen.

Cl.- Kaj nun ni eksalutu la geaŭdantojn en Orienta Germanio.

A.- Detlev BLANKE sendis al ni tre detalan raporton pri la kongreso de lingvistoj, kiu disvolviĝis en Berlino de la 10-a ĝis la 15-a de aŭgusto 1987, reliefante tion, kio diriĝis koncerne interlingvistikon kaj esperantologion. Ni resume citas lin.

Cl.- Interlingvistikaj problemoj ĝis nun ludis certan rolon en la kadro de internaciaj kongresoj de lingvistoj nur tri fojojn. En 1931 dum la dua kongreso de lingvistoj en Ĝenevo, en 1948 dum la sesa kongreso en Parizo kaj en 1987 dum la 14-a en Berlino. En 1931 [Otto Jespersen](#) diskutigis la lingvistojn pri la problemo de artefarita lingvo kaj popularigis la nocion 'interlingvistiko'. En 1948 la bazan raporton por la sekcio D) Interlingvistiko, donis [André Martinet](#). La 14-a kongreso, kiu okazis de la 10-a ĝis la 15-a de aŭgusto 1987-a en Berlino, traktis do la kadran temon : Unueco kaj diferenco en la nuntempa lingvoscienco, disciplinoj kaj interdisciplinaj alproksimiĝoj kaj rezultoj. Pro la bona reputacio, kiun interlingvistiko ĝuas en lingvistikaj rondoj de GDR, ne estis malfacile proponi al la organizantoj enkadrigon de koncerna temaro en la kongresan programon. Ekzemple dum la kongreso funkciis kiel numero 13-a de la oficiala ronda tablo interlingvistiko-planlingvoj, unu el dudekdu de tiaj rondaj tabloj. Ĝin iniciatis, preparis kaj gvidis d-roj Detlev Blanke, [Ronald Löttsch](#), ambaŭ el GDR kaj Sergej Kuznecov, Moskvo. Dum du kunvenoj de la ronda tablo, kiu estis indikita en la kongres-programo kaj sur la informtabuloj, estis prezentitaj entute 9 kontribuoj po 20 minutaj kun 20 minuta diskuto.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon ni daŭrigos tiun salutadon al geaŭdantoj. Claude kaj Andrée Gacond diras al vi: Ĝis reaŭdo!